FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto : S-ro R. Cl. COLAS,- 6, rue de Mézières - 75006 PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY,-43,quai de Champagne - 94170 LE PERREUX SUR MARNE
Kasistino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux,- 27700 LES ANDELYS

C.C.P.-Association Cath. Franç. pour l'Espéranto - ROUEN - 23 24 93 N.-

=== le N° : 2 Fr-; Abono : 7 Fr; kotizo : 1 Fr; === sume : 8 Fr-=======
::
Sendu la materialon por la bulteno al S-ino J. VINCENT, antaŭ la 20-a de marto, junio, septembro kaj decembro.
++
N° 102 --- BULLETIN TRIMESTRIEL ------- TRIMONATA BULTENO ---------
========== Sankta PIO-Xa, preĝu por ni. ------- Oktobro 1974 ----
xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

B I L E T O D E L A P R E Z I D A N T O

Au moment où j'écris ces lignes, la vie reprend le pas sur les mois consacrés, plus ou moins, pour chacun de nous à une relative détente... Mais notre journal quotidien nous a rappelé, au fil des jours, que notre humanité continuait, avec ses passions, ses conflits, ses réglements de comptes porteurs de plus de misére, de plus de douleurs... Parmi ces conflits il en est qui, pour n'être pas sanglants, provoquent ou amplifient une crise mondiale, bousculant la tranquilité précaire à laquelle nous avons cru pouvoir nous abandonner.

Pourtant nous releverons aujourd'hui, parmi les motifs de joie qui se sont présentés à notre attention, deux manifestations qui ont pris une place importante dans l'actualité, dumoins celle qui touche de plus près la présence du spirituel dans le monde.

D'abord"le Concile des Jeunes", où, avec une spontanéité et un élan remarquables, des jeunes ont répondu à l'appel qui leur a été lancé de Taizé, et ont affirmé, dans un élan commun, qu'ils engagaient leurs personnes au service des hommes et des nations dans et avec le Christ, à quelque église qu'ils appartiennent.

En second lieu,aprés les manifestations OEcuméniques, nous citerons le Synode Romain prolongement et suite logique du Concile Vatican II où les Evêques d'Occident et d'Orient se pencheront sur la mission des Apôtres, qui est la leur par exellence, mais aussi celle de chacun d'entre nous. Toutes les parties du monde y seront représentées, et le mot "Mission" ne sera plus synonyme de "colonisation"; les experts consultés seront des évêques, des prêtres, des laïcs, des femmes et des religieuses, et parmi ceux qui sont interpelés à intervenir, le Pasteur Potter, Secrétaire Général du Conseil OEcuménique.

La rentrée trop récente ne m'a pas encore permis de recueillir des informations précises sur la rencontre IKUE-KELI de cet été. Une carte amicale, portant des signatures connues et inconnues m'est parvenues, et je remercie ceux qui, en me l'adressant, ont salué l'Association qui la nôtre. Cependant, je ne peux m'empêcher de penser à ce que seraient des rénions comme celles que je vient de citer

.../...

.../...
si une langue commune, parlée par tous, permettait à chacun d'exprimer et de comprendre directement, dans toutes les nuances de la pensée, l'ensemble des débats.

Le chemin est encore long, sans doute, avant que la route que nous suivons pour doter notre monde de la langue qui rapproche et unit et la voie vers le règne pacifique du Christ qui s'efforcent à la fois de tracer les jeunes qui veulent façonner l'avenir et les "sages" porteurs de la responsabilité des communautés si diverses parviennent à se rejoindre.

A notre façon, qui n'en exclut aucune autre, nous avons le devoir d'apporter notre participation active. Notre effort nous portera à la fois à être chrétiens dans le monde mouvement espérantiste, mais aussi à nous manifester comme espérantistes dans les milieux chrétiens.

R. Cl. COLAS

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

B I B L I A V O R T O : K O N I

"Koni... laù la biblia vortosenco": tion oni ridete diras. Kaj estas vere, ke la Biblio uzas tiun vorton por signifi la seksrilaton de viro kaj virino :"Adamo konis sian edzinon, ŝi naskis filon..." (Gen.4,25). Sed tio estas nur unu el la aspektoj (la plej forta sendube) de la kono laù la biblia vortosenco.

Por ni la kono kuŝas en la sfero de la ideoj, de la scio. Sed pluraj dirmanieroj aludas pri alia sfero. "Koni la malsaton, koni la humiligon". Tiam temas pri spertaj konoj. Ĉu tiu kono el spertoj ne estas nepre necesa, eĉ kiam ĝia motivo staras ekster ni ? "Koni, diris St Exupery, estas eliri al vido. Sed por vidi, unue estas necese partopreni".

Tiel en la Biblio "koni" estas vorto ŝarĝita de sperto. Koni la suferon, por la Servisto de Javeo (Jes. 53) tio signifas, ke oni estas premegita de ĝi. Kiu konas la militon, tiu estos militinta (Jĝ 3,1-2). Kiu konas la pekon, tiu estas pekinta (Sĝ 3,13)..Same kiu konas iun, tiu rilatis kun li.

Do la kono de Dio neniam estos nura memsa ago, sed afero, kiun penetras la "koro". Dio donas "Koron por koni" (Dt 29,3) al la popolo, kun kiu Li aliancas : "Mi metos mian Leĝon en la fondon de ilia persono... tiam ili ne plu bezonos instrui sin reciproke, dirante unu al la alia : ekkonu Javeon ! sed ili ĉiuj konos Min" (Jer 31,33-34; OS, 2,22).

Tial en la Nova Testamento la vera kono de la Patro estas donita al tiuj, kiuj eniras en la intimecon de Jesuo-Kristo (Joh1,14,7) per la Spirito, kiu transformas la korojn (1 Kor 2,10-16). Jesuo, ja estas la sola kiu vere konas la Patron (Mt 11,27 ; Joh 6,46;7,29;8,55; 10,15) pro sia intimeco kun Li : "La Patro kaj Mi estas unu (Joh 10,30). Li ankaù estas la sola, kiu profunde konas la homon (Joh 2,24-25) kaj kapablas konigi sin mem, kiel Li mem konas : "Mi konas miajn ŝafinojn kaj miaj ŝafinoj konas min"(Joh 10,14). Komunii kun Jesuo kaj lia Patro, tio estas la sekreto por koni Dion (1 Joh 1,3). Kiam mi estos en la perfekteco de la Karitato, "tiam mi konos, kiel mi estas konata" (1 Kor 13,12).

(El"La Bible et son message" N° 64)

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

La konsilia kunveno okazos la 8-an de decembro 1974, je la 14 h 30 en la sidejo de U.F.E., 4 bis ,rue de la Cerisaie, Paris -4-
Iu ajn povas ĉeesti kiel observanto. - metro : Bastille -

L I N G V A A N G U L O

Post la preparado de la julia numero alvenis novaj tradukoj de S-ro Dauchez :
1) esti fikse rigardata, ŝance trafi rigardon; 2) por esti plene certa; 3) efektivigi rimarkindan agon; 4) la afero estas sukcesonta; 5) pruvi sian estrecon; 6) sin senti en angoro; 7) iru al la diablo; 9) ŝajnigi senintereson; 10) aspekti senatenta.

Jen la respondoj al la julia proponoj. Sendis ilin Sroj Bourgois (B), Dauchez(D), Despiney (De), Guillon (G), S-ino Michau (M).

1) Malmilde agi, agi per fera mano, forte bati (B); trafi laù malmilda maniero (Da); troigi (De); senhezite kaj energie agadi (G); ne molece frapi (M).
2)malmodere agi, trapasi la limojn (B); trotaksi (Da); nemodere agi (De); tiri troan profiton (G); ne modere preni (M).
3) malsukcese fornuliĝi, fiaski (B); kvazaù fandiĝi (DA); post bona komenco fuŝiĝi (De); konfuze finiĝi (G); senglore mistrafi (M).
4) iri rekte al la afero, preterlasi la flankvojojn (B); rekte iri al la celo (Da); rekte trafi la celon (De, G); senhezite agi (M).
5) ne estas eĉ unu vivulo (B); tie ne estas vivanta estaĵo (Da), neniu loĝas tie (De); ne troviĝas iu homo (G); estas tute senvive (M)
6) konfesi sian kulpon (B); publike pardonpeti (B,Da) peti senkulpigon (De); publike konfesi sian kulpon (G); publike penti (M).
7) kaŝiĝas serpento sub la herbo (B); komploto tie kuŝas (Da); estas io kaŝita (De); evento prepariĝas (M).
8) atendaĉi (B); longe atendadi (Da); atendi akcepton (De); atendi aùdiencon, okupi transiran postenon (M).
9) li estas siaspeca fenomeno, li estas neimitebla (B); poste ne plu necesas serĉado (Da); oni ne povas fari pli bone ol li (De); neniu li sekvos -G); li estas ne kompareble supera (M).
10) sin provizi je pacienco, ja pacienci (B); sin prepari al pacienco, ja pacienci (B); sin prepari al pacienco(, toleri sen plendo (Da); atendi gardante sian kvietecon (De); klopodi por resti pacienca (G); provi paciencemon (M).

Neniu ĉifoje meritas la honorpalmon.

* * *

Novaj proponoj de S-ro Bourgois : 1) arranger aux petits oignons; 2) arriver avec armes et bagages; 3) arriver par la force des poignets; 4) arrondir les fins de mois; 5) être à son article; 6) asseoir son autorité; 7)l'assiette au beurre; 8) assurer ses arrières; 9) Il n'attache pas son chien avec des saucisses; 10) avaler des couleuvres.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

INFORMOJ :

La klubo Roubaix-Tourcoing dediĉos sian kunvenon de la 17-a de novembro je la 15-a horo al "Kutimdiroj". Gvidos ĝin S-ro Bourgois, regula kunlaboranto de nia lingva angulo.
La 15-an de septembro, la regiona renkontiĝo okazis en Achiet, ĉe nia religia konsilanta S-to Bourdon.

TRA LA GAZETARO :

PAX CHRISTI, en sia numero de junio 74, aperigis raporton pri nia kongreso en Angers.
La redakcio danke akceptas la gazetaltranĉajojn pri Esperanto.

B I B L I O K A J J U R O

Origine la rajtoj kaj devoj de la civitanoj transsendiĝis parole. Poste, la malnova testamento enhavis ne nur religiajn regulojn,

.../...

.../...
sed ankaù moralajn kaj religiajn legojn. La nova testamento konfirmis la civilajn kaj moralajn leĝojn de la Izraelidoj.

Post kiam Imperiestro Konstanteno estis kristaniĝinta, Justiniano inspiriĝis per tiuj leĝoj, kaj redaktis simpligitan leĝaron. ĝin oni nomas:"Romiana Juro".

Nia nuna juro fontas el la leĝaro verkita de Imperiestro Justiniano Ekzemple, Justiniano skribis : "Pater is est, quem nuptiae demonstrant" El tio devenas la regulo : Ido koncipita dum la edziĝo de siaj gepatroj havas kiel patron la edzon de sia patrino."

La regulo : "Actor sequitur forum rei" plenumiĝas kaj postulanto rajtas ataki sian kontraùulon nur ĉe la juĝejo je lia hejmo.

Antaù nelonge, ĉe la Orleana asizo, la ĵurianoj devis "ĵuri antaù Dio kaj la homoj ....

Tiuj vortoj fontos el la Biblio.

Jean-Marie GUILLON

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

SOLVO DE LA KRUCVORTOJ .

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	M	E	M	M	O	R	T	I	G	O
2	A	M	I	■	N	E	■	N	U	R
3	T	E	O	L	O	G	■	■	A	N
4	E	R	P	I	■	I	L	I	N	I
5	R	I	O	■	E	M	A	■	A	T
6	I	T	■	A	M	E	R	I	K	O
7	A	V	■	M	O	N	D	■	■	L
8	L	■	F	F	■	T	I	L	I	O
9	O	L	E	O	J	■	L	A	N	Ĝ
10	J	A	R	R	A	P	O	R	T	O

Inter la kvar ricevitaj solvoj, nur unu estas ĝusta, tiu de G-roj Villeneuve (Essonne), kiuj ricevis Esperanto-Libron.

La redakcio atendas novajn ludojn, enigmojn, anekdotojn porla

DISTRA PAĜO !!!

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

A L L A G E K N A B O J

FRATECO : vorto legebla sur la frontono de niaj multnombraj urbdomoj.
LA UNUIĜINTAJ NACIOJ : organizado facile konebla en la nuntempo.
EKUMENISMO : movado facile praktikebla depost la lasta koncilio.
UNU HOMARO, UNU LINGVO : devizo facile sciita inter la esperantistoj.
ILI ESTU UNU : frazeto facile trovebla en la johana evangelio.

Multaj facile proklamas tiujn ĉi aĵojn kaj ecojn.

Sed kion ni vidas sur nia planedo; en nia lando, en nia urbo ? Ni vidas multe de dividoj, ĉu sociaj, ĉu politikaj, ĉu religiaj.

Kian heredaĵon donis al ni niaj antaùuloj por ne diri niaj samtempuloj !

Tamen ĉiuj bone scias, ke "plej efika pridiko estas praktiko". Kial montri la domon de la Unuiĝintaj Nacioj estas malunuiĝintaj? Kial konfesi la ekumenismon se la kredantoj je Kristo estas senĉese dividitaj, eĉ kelkfoje kontraùuloj ?

Kompreneble mi povus pli daùrigi la kritikadon, sed por trafi kian celon ?

*

Pli bone estas pripensi la farotaĵon.

Sed mi ne povas anstataùi vin.

Do bone legu ĉu iuj el vi povos skribi al mi, kion ili pensas pri tiu problemo kaj, kiel ne, kion ili faras, aù almenaù bonvolus fari por solvi tiun ĉi problemon.

Du motivoj povas vin helpi, geknaboj por labori al la unueco de la homaro :

.../...

.../...
via fido ne nur proklamita sed ĉefe vivoplena kaj via esperantismo, kiu alproksimigas vin al la tutmondaj geknaboj. Jen la idealo, kiun Unuiĝo Katolika proponas al vi. Granda idealo, ĉu ne ?

Koran saluton al ĉiuj geknaboj en nia movado,

Roger DEGRELLE

* sed ne malpermesita al plenkreskuloj.

==========

NEKROLOGO : Auguste BROISE.

Li naskiĝis en 1901 en Somme, studis en Lorient, eklaboris en Vannes kiel impostisto, samtempe preparante la konkurson pri inĝeniero ĉe la publikaj ŝtatlaboroj, konkurson, kiun li sukcesis en 1926. Lian inĝenierkarieron li finis en Eure-et-Loir en 1966 kaj retiriĝis en Eure, kie li mortis ĉisomere. Li eklernis la I.L. en 1925, estis delegito de UEA, direktoro de la sekcio "Teknikaj vortaroj" de la Akademio de Esperanto, sekcio en kies laboroj li aktive partoprenis. Li estis dumviva membro de nia asocio kaj regule kunlaboris en la lingva angulo de nia Bulteno. Diservon por la ripozo de lia animo celebris S-to Goudé en Vieil-Baugé la 28-an de Septembro.

Li pace ripozu !

++

NOTO DE LA KASISTINO :

Ĉar nia kotizo egalvaloras 10 poŝtmarkojn (interna afranko de letero), la tarifo estos 8 Fr ekde ka 1-a de Januaro 1975. Sekve, la kotizo de infano iĝos 4 Fr, membro subtenanto 40 Fr kaj dumviva membro 160 Fr-

Atentu bone : se vi pagos antaŭ la 31-a de decembro 1974, vi rajtos uzi la malnovan tarifon !

==========

KOTIZTABELO 1975.

IKUE kun "Espero Katolika"	21 Fr
IKI kun "Vojo,Vero,Vivo"	5 Fr

Peranto : G. Véron, C.C.P.- ROUEN 1188 63 Z

ACFE kun "Franca Kotolika Esperantisto"	8 Fr
Infano malpli ol 16-jara, sacerdotoj,religiuloj-ulinoj...	4 Fr
Membro bonfaranto	40 Fr
Dumviva membro	160 Fr
UFE kun "Revue Française"	60 Fr
UEA kun "Esperanto" kaj "Jarlibro"	85 Fr

C.C.P.- Association Cathol. Franç. pour l'Espéranto- ROUEN- 23 24 93 N-

Abono al "Biblia Revuo"
Peranto : G. Baudry C.C.P.- Lille 4704 43-

==========

Dépôt légal : 4° trimestre 1974 /// Polycopié par : F.M.C.-
Papier de Presse N° : 34.745- /// Prieuré Saint-Martin
Directeur-Gérant : Gaston VERON /// LA HOUSSAYE EN BRIE
/// 77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

==========